

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang



Nr. 7, Juli 1950

Kongreß der Jugend

Delegierte aus 16 Ländern beim Internationalen Esperanto-Jugend-Kongreß in Konstanz



Die Silhouette von Konstanz

stellt sich uns dar, eingefasst vom Grün der Bäume und des Sees und überwölbt vom zarten Blau des süddeutschen Himmels

Über 300 Vertreter aus den Ländern Algerien, Schweiz, England, Holland, Dänemark, Schweden, Finnland, Irland, Frankreich, Österreich, USA, CSR, Ungarn, Italien, Polen und Spanien haben sich bereits zum Internat. Esperanto-Jugendkongreß angemeldet, der vom 28. Juli bis 4. August in Konstanz stattfindet. Aus England werden nicht weniger als 110 Teilnehmer erwartet; aus den Ländern Holland, Dänemark und Frankreich, wo Esperanto eine besonder große Verbreitung besitzt, kommen Gruppen von je 40 bis 50 Teilnehmern. So wird u. a. eine eng-

lische Oberschulklasse aus Manchester mit einem eigenen Omnibus mit ihren Lehrern durch Frankreich und die Schweiz nach Konstanz kommen, um hier eine Woche froher Gemeinschaft zu verbringen. Gut zwei Drittel der Teilnehmer werden Ausländer sein. Der Kongreß findet in enger Zusammenarbeit mit dem Freiburger Institut für Internationale Begegnungen sowie mit Unterstützung des Service Rencontres Internationales vom Hohen Kommissariat statt, und nur dadurch wird

es möglich sein, diese Veranstaltung überhaupt durchzuführen.

Das Verkehrsamt des Stadtkreises Konstanz hat mit der Esperanto-Fassung des Konstanzer Bildprospektes einen guten Erfolg zu verzeichnen, indem laufend Prospektanfragen aus den verschiedensten Ländern eintreffen, die in der gewünschten Anzahl (die Brit. Esperanto-Gesellschaft wünschte z. B. gleich 500 Stück) nicht einmal befriedigt werden können. In ausländischen Zeitungen, wie dem Manchester Evening News oder der dänischen Politiken, erschienen im Zusammenhang mit dem Jugendkongreß bereits eingehende Vorberichte. Die offizielle Sprache wird bei dem Kongreß selbstverständlich Esperanto sein. Diese Welthilfssprache, die sich seit 60 Jahren ihres Bestehens bestens bewährt hat und ihre Anhänger praktisch in jedem Land der Erde besitzt, wird das Bindeglied sein, das die Teilnehmer zu einer großen Familie zusammenschließt.

Der eigentliche Zweck des Intern. Esperanto-Jugendkongresses ist es, den Jugendlichen aus den verschiedenen Ländern einen persönlichen Kontakt zu ermöglichen, und darauf ist auch das Programm (die nationalen Festabende, gemeinsame Ausflüge, Diskussionen usw.) abgerichtet. Es werden aber auch besondere Zusammenkünfte der etwa 80 Lehrer, der Studenten und anderer Fachrichtungen stattfinden, die, ähnlich wie beim letztjährigen Kongreß in Versailles, wieder besonders fruchtbar zu werden versprechen.

Wie wir erfahren, werden der Präsident der Esperanto-Weltjugendorganisation: Direktor C. Geurts (Holland), der Präsident des Deutschen Esperanto-Bundes: Dr. S. Ziegler (München), der Präsident der Schweizerischen Esperanto-Gesellschaft: F. Liechti (Schweiz), sowie der Leiter der Jugendsektion des DEB an dem Kongreß teilnehmen.

Oberbürgermeister Knapp, Konstanz, als Ehrenvorsitzender des Organisationskomitees wird die Eröffnungsansprache in Esperanto halten, was ihm bestimmt die Anerkennung und Sympathie der Anwesenden sichern wird.

Juvelo ĉe lago: KONSTANCO

Ekzistas sur la landkarto de Germanujo malmultaj partetoj, kun kies nomoj ligiĝas vole-nevole la imago pri gajaj feriotagoj. Tiajn imagojn oni havas, aŭdante la nomojn Konstanco kaj Konstanca Lago (germane: Bodensee). Fakte, la malnova metropolo ĉe la Lago Konstanca, situanta en diversforma, gaja pejzaĝo kun vere suda ĉarmo, kunigas en si ĉiujn premisojn de ĝuoplena refreŝiga libertempo. Tie, kie la juna Rejn-rivero trafluas la mallarĝan terkolon inter la Supra kaj Malsupra Lagoj, etendiĝas sur la Konstanca funelforma terparto la klasika pontokapa urbo kun sia intima fizionomio, netrafita de la milito, sen iu detruita domo. Fremdulo, vaganta tra la angulaj strategoj kaj vojetoj de la malnovaj kvar-taloj, kaj admiranta la malnovajn patriciajn domojn kaj la fierajn kanonikejojn, la fortikajn defendoturojn kaj la respektindajn preĝejojn, agrable perceptas la kultursaturitan fonon, antaŭ kiu okazas la moderna vivo de tiu laborema urbo. Konstanco estis ĉiam ne nur la plej granda loko, sed ankaŭ la plej elstaranta kulturcentro de la tuta lagregio. Post la milito la reputacio de la urbo ankoraŭ grave kreskis. Esprimo de tio estas, ke la nombro de la turistoj fariĝas ĉiun jaron pli alta. La progreson de tiu turisma loko kaŭzas antaŭ ĉio la cirkonstanco, ke la okupacia armeo malokupis preskaŭ ĉiujn por turistoj bezonatajn hotelojn, gastejojn kaj loĝejojn tiel, ke ĉiu vojaĝanto trovas loĝeblecon, kiu respondas al liaj individuaj deziroj aŭ al lia monujo.

Centra pejzaĝo por eŭropa turismo

Konstanco estas facile atingebla de ĉiuj flankoj per aŭto, ŝipo aŭ vagonaro. La ĉiuduonhore veturanta pramo por pasaĝeroj kaj aŭtoj inter Konstanco — Meersburg estas la ponto al la norda lagobordo. Ankaŭ la densa reto de la multaj vaporsipaj linioj kaj la rapidaj urbaj motorboatoj pliproksimigas la bordojn unu al la alia, sur kiuj Konstanco sendube estas la plej favore situanta deirpunkto por ekskursoj en la tutan lagregionon inkluzive de la proksimaj Vorarlbergaj Alpoj. Krome la limurbo en la «centra pejzaĝo por eŭropa turismo» estas la deirpunkto al Svislando. La ŝataj ekskursoj de la Konstancaj aŭtobus-entreprenoj, la specialaj veturadoj per ŝipoj aŭ vagonaroj al Centra kaj Orienta Svislando, sed ĉefe vojaĝo per la Konstanclaga zonerfero, kiu tuŝas ankaŭ Aŭstrujon kaj Svislandon, faciligas kaj antaŭ ĉio ankaŭ malplikarigas la flankviziton en la najbaran eksterlandon.

Plej elstara juvelo de l' Regno

La avantaĝoj de unike bela pejzaĝo kaj centra turisma situo akordiĝas en Konstanco kun la romantika ĉarmo de grandaj historiaj memoraĵoj. La malnova libera regno-urbo, la brila episkopa rezidejo, estiĝinta el kelta-roma kolonio, estis dum la tuta mezepoka rava allogaĵo por la vizitantoj, «plej elstara juvelo de l' Regno». Ne nur dum la tagoj de la Konstanca Paco (1185), en la jaroj de la Ekumena Koncilio (1414/18) aŭ

dum la granda Regna Parlamento en la jaro 1507, la bela, fiera urbo havis internacian fizionomion, sed ankaŭ en normalaj epokoj la granda komercloko estis renkontejo de reprezentantoj de ĉiuj eŭropaj nacioj.

La lago donas vivon kaj ĝojon

Konstanco situas apud la «plej favorata lago de nia kontinento»: La Lago Konstanca (76 km longa, 14 km larĝa kaj profunda ĝis 252 m) konsistanta el tri partoj, kiuj estas ligitaj unu kun la alia: la granda Supra Lago, la Ueberlingena Lago kaj la okcidente situanta Malsupra Lago. Tie, kie la folioj de tiu blua trifolio kunigas, kuŝas Konstanco, meze de riĉa loka komercregiono. Verŝajne ĉe neniu alia lago sur la tero ariĝas tiel multnombraj urboj, vilaĝoj, kasteloj, monaĥejoj, preĝejoj, kaj kapeloj, bienoj kaj kamparaj domoj, kiel ĉe la «Svaba Maro». En ĝiaj ondoj speguliĝas la tuta ĉeno de la Svisaj kaj Vorarlbergaj Alpoj, ĝiajn bordojn akompanas en multkolora varieco vinberujoj, arbarostrioj kaj fruktarbejoj.

Sporturbo kaj...

Milda, nevarianta kaj je pluvo malriĉa klimato ebligas en Konstanco pli longan bansezono ol en klimato malpli favorataj regionoj. La libertempulo povas elekti inter tri banejoj: la libera banejo Horn, la monduma strandbanejo Jakob kaj la nova kurac- kaj halobanejo, unika en Germanujo pro la kombino de libera enrivera banejo, naĝohalo kaj kuracbanejo, ofte okazejo de interesaj naĝkonkursoj internaciaj. La saman intereson ĝuas la ĉiujare okazantaj internaciaj rem- kaj velboataj vetkuroj en la Konstanca golfeto. Sed ankaŭ la ovalegon de la nova, en la arbara, monteja pejzaĝo harmonie konstruita stadiono plenigas dum la konkurstaj tagoj multmila homamaso, ĉu temas pri piedpilkado, ĉu pri gimnastikaj aŭ boksaj konkursoj.

...restadejo de la muzoj

Apud sporto kaj privataj teatroj kaj dancejoj de la urbo, apud la ekscita ludo de la blanka globeto, kiu ruliĝadas en la ludkazinoo, Kon-

stanco estas — tradicio devigas! — preferata restadejo de la muzoj. En la «Germana Teatro» de Konstanco okazas tutaj serioj da multe aplaudataj novaj scenarangoj kaj unufojaj prezentadoj. La kastelkoncerto en la unika kadro de la insulo Mainau (Majnaŭ), la serenadoj en la harmonioplana korto de l' Konstanca urbdomo, estas por impresema vizitanto travivaĵo de neforgesebla ĉarmo. La fama Rosgarten-muzeo enhavas plej valorajn artajn kaj kulturhistoriajn trezorojn, dum por la literaturamanto kaj scienculo estas je dispono tuta aro da bibliotekoj.

Insulaj revoj

Neniam la ferioĝasto enuigas, ankaŭ ne dum malbela vetero. En la bone prizorgita Urba Gardeno okazas koncertoj; ĝuoplenaj promenadoj logas sur la bordostrato, unu el la plej belaj korsoj de Eŭropo. Neniu fremdulo preferas viziton al la du belegaj insuloj Mainau kaj Reichenau, proksime de Konstanco. La unua estas revaĵo de suda beleco, brilanta juvelo en mirinde bela kadro kun kurioza barokstila kastelo kaj belega parko, en kiu orangoj kaj citronoj plene maturiĝas, la dua estas unu el la plej malnovaj kristanaj kulturcentroj sur germana tero kun trio da interesaj romanikaj preĝejoj; ambaŭ havas ion komunan: la ekziston de malnova kulturo kaj la mirindan belecon de situo kaj pejzaĝo.

Ĉiu, kiu estas impresibla de la karakterizaĵoj de germanaj pejzaĝoj, ĉiam denove sentos sin logata al la blua lago, en kies akvoj respeguliĝas jarcentoj, eĉ jarmiloj, kaj sur kies bordoj estas kunigitaj en multkolora varieco la kontrastoj de alta kaj meza montaroj kaj montetebenaĵoj. Restado en Konstanco, la metropolo de tiu favorata regiono, estas travivaĵo, pri kiu oni ankoraŭ dum longa tempo memoras; ĝi donas ĝojon, malstreĉon kaj refreŝigon, kiujn ni ja ĉiuj tiel ege bezonas. Kaj la Esperantisto, precipe la juna, scias ke de la 28a de Julio ĝis 4a de Aŭgusto 1950 okazos en Konstanco la 6a Internacia Junular-Kunveno de la Tutmonda Junular-Organizo (TJO).

Difinoj

Amiko estas persono, kiun oni konas tre bone kaj kiun oni tamen amas.

Banko estas institucio, kie iu povas pruntepreni monon, kondiĉe ke li povas prui la nebezono.

Budĝeto estas inventaĵo, ĉe kiu oni koleras antaŭe pri elspezoj, anstataŭ poste.

Cefo estas viro, kiu venas je preciza horo en la oficejon, ĝuste kiam oficisto malfruas, kaj kiu malfruas, kiam la oficisto alvenas ĝustatempe.

Envio estas la trotakso de la bonfarto de la aliulo.

Financoj estas krucvort-enigmoj por la ŝtato.

Kapitalo estas la mono, kiun posedas la aliaj.

Konferenco estas la batalo pri majstreco ep daŭra belatorereco.

Kredito estas la konfido en monaferoj, kiun posedas tiu, kiu ne bezonas ĝin.

Rilatoj estas tio, kion oni opiniis posedi, antaŭ ol esti provinta ilin eluzi.

Sperto estas tio, kio postrestas, kiam oni ĉion perdis.

Sukceso estas miksaĵo de bonŝanco, lerteco kaj senskrupuleco.

Virino partoprenas la ĉagrenon de la viro, duobligas la ĝojon kaj triobligas la elspezojn.

(El „Esperanto“.)

Seit fünf Jahren versammeln sich zweimal jährlich in den Städten von zweiundzwanzig Ländern Zehntausende von Kindern aller Nationen und Sprachen. Mitte Dezember begehen sie ihren Weltfreundschaftstag, und Mitte Mai treffen sie sich zu einem Frühlingsfest in Paris, London, New York, Tokio und allüberall. Über nationale und religiöse Schranken hinweg reichen sich die Jugendlichen die Hände zur Völkerverständigung. Millionen dieser Kinder schreiben sich Briefe, in denen sie ihre Erfahrungen austauschen. Sprachhindernisse gibt es nicht. Wenn ein Kind sich nicht mit seinem Freund oder seiner Freundin in einem anderen Land verständigen kann, so zeichnet es, so gut es vermag und schickt das Bild an Stelle von Worten, und das andere Kind antwortet in der gleichen internationalen Sprache deren Regeln das Herz diktiert. Seit dem letzten Dezember beteiligen sich auch deutsche Kinder an dieser Weltfreundschaftsstunde. Auch dieses Jahr vereinten sich die Kinder vieler Nationen und schenkten mit ihrem herzlichen Zusammenschluß selbst Skeptikern neue Hoffnungen auf eine friedliche Einigung unserer Kugel.

Dieser interessante Beitrag zur Völkerverständigung erschien in der „NZ-Wochenschau“. Wir freuen uns, daß nun wieder ein neues internationales Verständigungsmittel entdeckt wurde, d. h. entdeckt ja eigentlich nicht. Daß es Kindern zugute kommt, ist besonders hervorzuheben. Aber es entstehen doch immerhin einige Zweifel an der unbedingten Zuverlässigkeit dieser Methode, besonders seit wir ein nettes Geschichtchen lasen, das dieses Thema behandelte. Es spielte im alten Pharaonenland: ein junger Ägypter sandte seiner angebeteten Aida einen glühenden Liebesbrief in der Bilderschrift der damaligen Zeit; aber was war der Erfolg? Sie las aus den Hieroglyphen das gerade Gegenteil, und die schöne erträumte Idylle war schon vor Beginn — Essig. Natürlich war dieses Geschichtchen konstruiert. Aber ich fürchte, daß es bei der gemalten Kinder-Korrespondenz enttäuschende Wirklichkeit wird. Ist zu den Betreuern der Zehntausende von Kindern noch nie die geheimnisvolle Kunde gedrungen, daß es ein auch für Kinder erfreulich leichtes und sicheres Verständigungsmittel, einen Sprachschlüssel zur ganzen Welt gibt, der Esperanto heißt?

In einem Artikel „Nia mondo freneza“ spricht der Redakteur von Heroldo de Esperanto von den Usummen, die von fast allen Staaten für die Vernichtung von Menschenleben im Rahmen der sogenannten „Verteidigung“ alljährlich ausgegeben werden. Es sind Zahlen von beinahe astronomischer Größe, Schrecken einflößende Zahlen. Was in rastloser, unermüdlicher, friedlicher Arbeit von Millionen Menschen geschafft und geschaffen wird, es soll nur dazu dienen, eben diese Werke des Friedens in unermeßlichem Ausmaß zu vernichten — doch nicht nur das allein: das Menschenleben selbst, das kostbarste Gut das unsere Erde trägt, soll vertilgt, ausgerottet, zu nichts gemacht werden. Wahrhaftig, ist das nicht eine „mondo freneza“? Nein, nicht nur eine wahnsinnige Welt ist es, denn schließlich könnte man Wahnsinn ja noch eine Krankheit nennen, für die der Kranke nichts kann. Aber es ist nicht so: diejeni-

gen, die es in ihrer Hand haben wieviele Milliarden jedes Jahr aus dem Volk für Zwecke der ungeheuerlichsten Vernichtung herausgepreßt werden, sie sind nicht krank, sie sind im Gegenteil kalt berechnende Menschen, die mit den schärfsten Mitteln des Geistes bis ins einzelne genau die Vernichtung im vorhinein festlegen.

In seinem Schlußabsatz sagt der Verfasser:

Wenn die 60 oder mehr Tausend Millionen, die die jetzige Welt jedes Jahr für Rüstungszwecke ausgibt, für nützliche Zwecke verwendet würden (und vielleicht ein Zehntausendstel davon für die Verbreitung der Welthilfssprache ...), — wie unendlich glücklich und reich wäre die Menschheit, ganz gleich, von welchem politischen System sie regiert würde! Jetzt seufzen die Völker unter allen politischen Systemen, denn alle Regierungen zwingen sie, das Ergebnis ihres Schweißes dem Kriegsgott, dem Mars zu opfern!
Jfb.



ALFRED REHTZ

DIE Alfred-Rehtz-ECKE

Die Esperanto-Klasse

Ich war bei meinem Freund heut' in der Schule. Der Schüler Mienen waren froh gespannt. Sie übersetzten ohne Schwierigkeiten. Was er geschrieben an die schwarze Wand:
Finigi devas nun la mondmilito!
Auffören muß der Krieg, der Weltkrieg jetzt!
Se ne, la tero estos disrompata —
Wenn nicht, dann wird die Erde noch zerfetzt.
Car teruregaj estas niaj bomboj,
Weil unsere Bomben ganz entsetzlich sind,
Pereos la homaro tre rapide.
Die Menschheit wird zugrunde gehn geschwind.
La amo, la prudento devas venki,
Die Liebe muß jetzt siegen, die Vernunft,
La militistoj devas malaperi!
Sie muß verschwinden jetzt, die Kriegerzunft!
Laboro paca paradizon kreas.
Friedliche Arbeit Paradiese schafft.
Tekniko havas la sufiĉan forton.
Die Technik, die besitzt genügend Kraft.
La nova lingvo estas bona ilo,
Die neue Sprache wird ein Mittel sein,
Car de malamo ĝi nin liberigos.
Denn von dem Hasse wird sie uns befreien.
Das hat mein Freund dort auf das Brett geschrieben
Und seine Schüler schrieben eifrig mit.
Ich freute mich. Mir war's, als wenn der Schatten,
Der blutige, des Kriegs von dannen glitt.
Ich hoffe, daß solch Esperanto-Lehrer
Demnächst in allen unsern Schulen stehn,
Daß überall der Jugend klare Augen
Solch' Sätze auf der schwarzen Tafel sehn.
Dann wird es heller auf der Erde werden!
Vernunft und Liebe werden stärker sein
Als dummer Haß, der sich an Grenzen klammert!
Dann wird die Menschheit sich vom Krieg befreien!

Unser Mitarbeiter Alfr. Rehtz schreibt uns: ... und machen Sie bitte bekannt, daß ich mich freuen würde, wenn zufällig einer der Leser noch etwas von meinen vergriffenen Büchern hat (mir ist ja alles verbrannt): **Poesie des Weltalls** (naturwissenschaftliche Gedichte), **Licht und Schatten** (Balladen und Lyrik), **Der arme liebe Gott** (Freidenkergedichte), **Der grüne Stern**, **Der lustige Mathematikus**.
Wir erfüllen gern den Wunsch und fügen gleichzeitig die Anschrift bei: Alfred Rehtz, Schriftsteller, (24a) Hamburg 13, Isestr. 84 III. Wir bitten, sich mit Herrn Rehtz unmittelbar in Verbindung zu setzen.

In dieser Nummer:
Kongreß der Jugend
Konstanz — Juwel am See
Terra incognita
Rivalen von ehemals
Übersetzungsaufgaben
El la tirkesto de la redakcio
Aus Leserbriefen
Scherz, Spiel und gute Laune

Volapük und Esperanto

Volapük

-al dient zur Bezeichnung höher gestellter Personen; z. B. **dük** = Herzog, **dük-al** = Erzherzog
Dagegen: **bijop** = Bischof, **le-bijop** = Erzbischof
jaf = Schöpfung, **jaf-al** = Schöpfer (unlogisch!)

-än bildet Ländernamen, doch nicht ausschließlich; z. B. **Beljän** = Belgien, **Güpän** = Ägypten, **Nidän** = Indien, **Bodugän** = Portugal, **Löstän** = Österreich.

Doch:
Deut = Deutschland, **Glik** = Griechenland, **Nelij** = England, **Flent** = Frankreich.

-em ist die Endung für Sammelnamen, z. B.

bel = Berg, **bel-em** = Gebirge
blod = Bruder, **blod-em** Gebrüder, (**gems** = Geschwister)
gal = (das) Wachen, **gal-em** = Wache (unlogisch)
konsäl = Rat, **konsäl-em** = Kongress

-ul zur Bildung der Monatsnamen; auch Grundzahl mit -ul ist möglich; z. B.
yan-ul oder **bal-ul** = Januar
feb-ul oder **tel-ul** = Februar
mäz-ul oder **kil-ul** = März usw.

Zu c) Vorsilben:

blä- = schwarz, Verkürzung von **bläg** = Schwärze; z. B.
bük = Druck, **bläbük** Schwarzdruck

Die Kürzung der Vorsilbenstämme erleichtert die Sprechbarkeit, erschwert aber das Verständnis und zwingt zu neuen Regeln. Der Zweck ließe sich schon durch Anwendung der vollen, an sich kurzen Stämme erreichen.

Weiter gekürzte Stämme:

bi- = vor; [**bif** = vor (örtlich);]
silab = Silbe, **bi-silab** = Vorsilbe
zif = Stadt, **bi-zif** = Vorstadt

di = zer-; (**dit** = Trennung, Scheidung;)
lim = Glied, **di-lim-ön** = zergliedern

du- = durch; (**dub** = durch;)
gon = Lauf, **du-gon-ön** = durchlaufen

mö- = viel; (**möd** = Menge, Vielheit;)
flan = Seite, **mö-flan-ik** = vielseitig

no- = edel-; (**nob** = Adel;)
viet-ik = weiß, **no-viet** = Edelweiß

no- = un-; **velat** = Wahrheit, **no-velat** = Unwahrheit
(Ein und dieselbe Vorsilbe mit zweierlei grundverschiedener Bedeutung!)

7. Esperanto

ĉef- bedeutet Haupt-, Chef-, Erz-; z. B.

duko = Herzog, **ĉef-duko** = Erzherzog
episkopo = Bischof, **ĉef-episkopo** = Erzbischof

kreo = Schöpfung(stat), **kre-anto** = Schöpfer (jetzt Erschaffender, **kreinto** = erschaffen Habender, **kre-onto** = erschaffen Werdender)

-uj- (Nachsilbe) = Behälter; dient auch zur Bildung von Ländernamen; z. B. **Belgo** = Belgier, **Belgujo** = Belgien; **egipto** = Ägypter, **Egiptujo** = Ägypten; **Hindujo** = Indien; **Portugalujo** = Portugal; **Aüstrujo** = Österreich.
germano = Deutscher, **Germanujo** = Deutschland; **greko** = Grieche, **Grekujo** = Griechenland; **Anglujo** = England; **Francujo** = Frankreich.

-ar- (Nachsilbe) bezeichnet Ansammlung, Vereinigung gleichartiger Dinge; z. B.

monto = Berg, **montaro** = Gebirge
frato = Bruder, **fratoj** = (Ge-)Brüder, (**gefratoj** = Geschwister)
gardi = wachen, **gard-ist-aro** = Wache
konsili = raten, **konsil-antaro** = Rat(sherren), **kongreso** = Kongress
Eigennamen; z. B.

Januaro
Februaro
Marto

Keine besondere Vorsilbe, sondern Zusammensetzung mit
nigra = schwarz; **preso** = Druck,
nigra preso = Schwarzdruck

antaŭ- = vor (Präposition);
silabo = Silbe, **antaŭ-silabo** = Vorsilbe
urbo = Stadt, **antaŭ-urbo** = Vorstadt

dis- (Vorsilbe) bedeutet Trennung, auseinander, zer-; **membro** = Glied, **dis-membrigi** = zergliedern

tra- = durch (Präposition);
kuri = laufen, **tra-kuri** = durchlaufen

mult- (Stammwort), **multo** = Menge, **multa** = viel
flanko = Seite, **mult-flanka** = vielseitig

nobel- (Stammwort); **nobelo** = Adelliger, Edelmann

ne- = un- (nein, nicht);
ver-eco = Wahrheit, **ne-vereco** = Unwahrheit (Eigenschaft)

Übersetzungsaufgabe Nr. 16

UMGANGSSPRACHE ESPERANTO

Weltbürger Nr. 2, Rudi Herzberger, will jetzt einen „Afrika-Weltstaat der Freien“ gründen. Als Ausgangslandschaft seines Projektes hat er sich Abessinien erwählt.

Der neue Staat werde keine Wehrmacht haben, sondern nur Polizei. Die Umgangssprache soll Esperanto werden. Militärische oder politische Pakte sollen nicht geschlossen werden; nur wirtschaftliche Zusammenarbeit sei erwünscht.

Voraussetzung für die Staatsbildung sei allerdings, daß er einige Millionen Anhänger hinter sich bringe.

Solvo de la traduktasko n-ro 15

Vidu en n-ro 5, pğ. 36

Memfarita mondcivitana pasporto

En la haveno de Hobart (Tasmanio) alordigis la germana mondcivitano Georgo Dibbern kun sia velboato post marvojaĝo de kelkaj mil kilometroj. Li prezentis al la havena magistrato memfaritan pasporton, kiun ili agnokis.

En tiu skribajo estas dirite interalie: „Mi estas mondcivitano kaj amiko de ĉiuj popoloj. Mi respektas la leĝojn de ĉiuj nacioj.“

Dibbern havis sur sia boato, ekipita de du aŭstralianoj kaj unu novzelandano, propran flagon: ruĝa kruco sur blua cirklo kun blanka fundo kaj blua stelo en la maldekstra angulo.

Malpretenda demando: Ĉu mondcivitano Dibbern kiel „amiko de ĉiuj popoloj“ komprenas ĉiujn iliajn lingvojn? Kaj kiel li rilatas al Esperanto?

Idealo kaj praktiko

„Ni Esperantistoj serĉas nian porpacan laboron sur tereno lingva ekkoninte, ke lingvoj naciaj disigas la popolojn, sed lingvo unuforma kaj neŭtrala kunligas la popolojn inter si.“

Sed skeptikuloj kaj flanke starantaj personoj demandas pri sukcesoj kaj pri praktikaj efikoj.

Nu, la plej bonan pruvon, ke Esperanto estas vivanta ne nur en la idealoj de kelkaj unuopuloj, donas la estrado de la loka grupo esperantista en Holzminden, Malsupra Saksujo. Li korespondas de post unu jaro kun la tuta mondo kaj flegas interŝanĝon de pensoj kun 112 geamikoj el 41 landoj. Pli ol 200 vidajkartoj el 5 mondpartoj formas originalan kaj maloftan tapeton en lia laborĉambro kaj atestas pri tio, ke esperantistoj povas interkompreniĝi sen malhelpo de nacilingva alfabeto.

En lia malgranda ĉambro montriĝas la ekzisto de unika komuna lingvo, kiu ebligas praktikan interkompreniĝon inter Hindujo, Islando, Balkano, eĉ la tuta mondo.

(Wird fortgesetzt)

Ampetole

Belknabineĵ, mi amas vin,
Tuteerte vi komprenas,
Kaj kiam ni en noktsilent'
Sub astroriĉa firmament'
Sekrete kunpromenas:

Bus' odora,
Rozoflora,
Rava ĉarm' de vi;
Arda peĵ' elkora:
Kison do por mi!

Imagu kiel la arbar'
En luna lum' vigliĝas.
Elfinoj dancas kun gracia'
Laŭ neaŭdebla melodi',
Dum homoj enamiĝas.

Stel' ĉiela,
Vi tre bela
Donitaĵ' de Di'!
Ja la stelo hela
Brilas nur por ni!

Belknabineĵo, amu min
Kun gaja koro via!
El mia ĝemflatanta spir'
Parolas mia korsopir':
„Knabino, estu mia!“

Vi minjona,
Amodona,
Eta belulin'!
Ĝojas mondo sona,
Car vi amas min!

Bernd Hasecke.

Terra incognita

Esperanto-Ausstellung in Dortmund. Bücher, Zeitschriften, Werbeblätter, Spruchtafeln — lebhafter, anregender Wechsel. Rings an den Wänden große Kartonplatten mit bunten Bildkarten aus aller Welt. Auf kleinen weißen Schildchen steht der Name des betreffenden Landes, dem die einzelne Kartengruppe entstammt. — An der einen Wand, zwischen den Karten aus Italien, Bulgarien und Jugoslawien hängt ein Bogen mit Fotografien aus dem Leben der Dortmunder Esperanto-Gruppe; er trägt ebenfalls ein Schildchen, auf dem kurz und schlicht das Wort „Fotografien“ steht.

Sonntagnachmittag. Reger Besuch. Unter anderen zwei Knaben. Mit großen Augen betrachten sie die dargebotene Schau, vor allem aber die lockende Buntheit der Kartenreihen. Voll Staunen und Ehrfurcht vor der weltumspannenden Fülle gehen sie fast auf Zehenspitzen langsam die Wände entlang.

Plötzlich stockt ihr tastender Schritt. Erschrocken gleiten ihre Augen über einige Schildchen. Italien, Bulgarien, Jugoslawien, Fotografien..

? — — Hilffloser gegenseitiger Blickwechsel.... Zweifel an dem Wissen ihres Erdkunde-Lehrers. „Fotografien?“ — Davon hat ihnen bisher noch niemand etwas gesagt, der Lehrer am wenigsten, und der hätte es doch eigentlich inzwischen längst erfahren können! Wo also mag dieses geheimnisvolle Land liegen? — Diese Frage ergreift sie und genügt ihnen, um sich für diesen Sonntag damit zu befassen. Langsam, schieben sie sich dem Ausgang zu.

Beim Verlassen des Raumes zupft der eine den andern am Ärmel und raunt ihm zu: „Mensch, da kannst du doch mal sehen, wo die nich' überall hinschreiben mit ihrem Esperanto...!“

Rudolf Seebacher, Dortmund



Somera dimanĉmateno

„Dimanĉo sin suprenŝovis ĉe la ĉielrando. La malhelverdaĵ herberoj portis siajn fruntetojn ornamitaj de diamantaj perloj, kaj lumetis kaj briletis en la senlima Dia templo. Kiel pastrino de Dio, alte super ili, levigis sinjorino Suno, kaj disverŝis en larĝaj radi-garboj sian benon“ . . . Iam, en mia juneco, mi legis tion en popollerneja legolibro, kaj tute senvole tiu simpla priskribo pri komenciĝanta dimanĉmateno restis en mia memoro, kaj ĉiam kiam ajn ekestas brila sunsomera dimanĉo, ili venas en mian kapon kaj plenigas min per gojo. Ankaŭ la ĉi-supra bildo, prezentanta idilian bordepecon ĉe la rivereto Fuldo, donas al mi ĉi tiun korgajigan impreson, kaj mi subite dezirus „ekpreni la migrulbastonon, por travagi la ĝardenon de Dio“, kiel ni legas en „Dektri tiloj“ de Weber.

Freue dich!

Freue dich deiner geringen Gaben, denn du weißt nicht, welchen Mißbrauch du mit größeren treiben würdest.

Freue dich, wenn dir nur wenig Besitz anvertraut ist; besser wirst du bestimmt nicht durch viel.

Freue dich, wenn der andere recht hat; du hast dann einen verkehrten Bruder weniger.

Freue dich, wenn dir eine Prüfung widerfährt; Unverbesserliche prüft man nicht.

Freue dich, wenn deine Bäume nicht in den Himmel wachsen; um so weniger werden sie krachen, wenn der Holzhauer kommt.

Freue dich, wenn kleine Dinge deinen Alltag ausfüllen; kleine Steine geben das beste Mosaik.

Freue dich, wenn du keine unbeschränkte Freiheit hast; hättest du sie, so würdest du sie nicht schätzen.

Freue dich, daß du nicht das Morgen kennst; du würdest das Heute noch mehr mißhandeln.

Freue dich, wenn du ein Vaterland hast; doch interessiere dich auch dafür, daß es ein Bruderland werde.

Freue dich, wenn nicht alle nach deiner Pfeife tanzen; so hast du doch Aussicht, mehr als ein Pfeifer zu werden.

Freue dich der Sonne; aber erlaube nicht nur deinem Gesicht, sich ihrer zu freuen.

Freue dich, wenn es dir nicht gut geht; denn es kann dir niemals so schlecht gehen, wie du es verdienst.

Freue dich, wenn du sitzengeblieben bist; denn Sitzenbleiben ist besser als ausgeschult werden.

Freue dich, daß du dich freuen kannst, denn die Übersättigten können es nicht mehr.

Freue dich. Und was du auch sonst Gescheites sagen magst — zweimal sage: Freue dich.

Müller-Gordon.

Ĝoju!

GOJU pri viaj malmultaj talentoj, ĉar vi ne scias, kian misuzon vi farus per pli grandaj.

GOJU, se vi disponas nur pri malgranda posedaĵo, ĉar certe vi ne fariĝus pli bona per multa.

GOJU, se alia estas prava, ĉar tiam vi havas unu fraton kontraŭan malpli.

GOJU, kiam vi estas tentata; neplu-bonigebluloj ne estas tentataj.

GOJU, ke viaj arboj ne kreskas en la ĉielon; des malpli ili krakos, kiam venos la arbaligisto.

GOJU, se malgrandaĵoj plenigas vian ĉiutagan vivon; ŝtonetoj rezultigas la plejbelan mozaikon.

GOJU, ke vi ne havas senliman liberecon; se vi havus ĝin, vi ne sufiĉe ĝin ŝatus.

GOJU, ke vi ne konas la morgaŭon; vi eĉ pli mistraktus la hodiaŭon.

GOJU, se vi havas patrolandon; sed ankaŭ intereso vin pri tio, ke ĝi fariĝu fratolando.

GOJU, ke ne ĉiuj dancas laŭ via fajfado; tiamaniere restas al vi la perspektivo fariĝi io plia ol fajfisto.

GOJU pri la suno; sed permesu ne nur al via vizaĝo ĝoji pri ĝi.

GOJU, kiam vi fartas malbone; neniam vi povas farti tiel malbone kiel vi meritas.

GOJU, kiam vi devas ripeti lernklason; ĉar tio estas pli bona ol esti ĵetata for de la lernejo.

GOJU, ke vi povas ĝoji; ĉar la tro-satigitoj jam ne povas ĝoji.

GOJU! Kaj kion ajn saĝan vi povas diri — dufoje diru: GOJU!

Trad. Mm.

Das Sprachenproblem in Indien

In Indien werden ungefähr ein Dutzend Sprachen gesprochen, dazu kommen noch 200 Dialekte innerhalb kleiner Landstriche. Der indische Ministerpräsident Pandit Jawaharlal Nehru vertrat in der „India News“, dem Organ seiner Regierung, die Ansicht, daß sich das gesamte Indien auf Hindustani einigen solle. Dabei will er diese Sprache auf einen Wortschatz von 3000 beschränken. Mit diesem Vokabularium, das auf die sprachlichen Bedürfnisse des Mannes aus dem Volke zurecht gemacht ist, komme dieser gut durch. Es könnte noch eine besondere Liste technischer Ausdrücke geschaffen werden. Im übrigen möge sich dann die Sprache aus sich selbst heraus weiter entwickeln.

P. K.

La grandaj Figuroj de l' Homaro en la kadro de la kalendaro

JULIO

En tiu ĉi monato naskiĝis:

- 1486 **Andrea del Sarto** — itala pentristo
- 1509 **Johannes Calvin** — svisa religia reformatoro
- 1511 **Giorgio Vasari** — itala pentristo, arkitekto kaj arthistoriisto
- 1602 **Jules Mazarin** — franca kardinalo kaj ŝtatestro
- 1606 **Rembrandt Harmensz van Rijn** — plej fama nederlanda pentristo kaj gravuristo
- 1621 **Jean de La Fontaine** — franca fabloverkisto
- 1646 **Gottfried Wilhelm v. Leibniz** — germana filozofo, kreinto de universalaj lingvo kaj skribo
- 1714 **Christoph Willibald Gluck** — germana komponisto
- 1715 **Christian Fürchtegott Gellert** — germana poeto
- 1723 **Joshua Reynolds** — angla pentristo kaj verkisto
- 1724 **Friedrich Gottlieb Klopstock** — germana poeto
- 1777 **Philipp Otto Runge** — germana pentristo
- 1796 **Camille Corot** — franca pentristo
- 1802 **Alexandre Dumas (père)** — franca romanverkisto
- 1804 **Ludwig Feuerbach** — germana filozofo
- 1804 **George Sand** — aŭtoronomo por baronino de Dudevant — franca romanverkistino
- 1811 **William Thackeray** — angla verkisto-humoristo
- 1816 **Joseph Arthur grafo de Gobineau** — franca diplomato kaj verkisto
- 1816 **Gustav Freytag** — germana poeto kaj verkisto
- 1819 **Gottfried Keller** — svisa poeto kaj verkisto
- 1830 **Camille Pissaro** — franca pentristo kaj grafikisto
- 1834 **James Whistler** — uson-angla pentristo kaj grafikisto
- 1843 **Peter Rosegger** — aŭstra verkisto
- 1847 **Max Liebermann** — germana pentristo kaj grafikisto
- 1856 **Bernard Shaw** — irlanda-angla dramisto kaj socialista verkisto
- 1858 **Lovis Corinth** — germana pentristo
- 1860 **Gustav Mahler** — aŭstra komponisto
- 1864 **Ricarda Huch** — germana poetino kaj verkistino
- 1864 **Frank Wedekind** — germana dramisto kaj aktoro
- 1867 **Max Dauthendey** — germana poeto
- 1867 **Käthe Kollwitz** — germana gravuristino kaj pentristino

- 1868 **Stefan George** — germana lirikisto
- 1877 **Hermann Hesse** — svisa poeto
- 1883 **Erich Heckel** — germana pentristo kaj grafikisto
- 1889 **Frans Masereel** — belga pentristo, desegnisto kaj ksilografisto

En tiu ĉi monato mortis:

- 1531 **Tilman Riemenschneider** — germana skulptisto
- 1535 **Thomas More (Morus)** — angla ŝtatestro kaj humanisto
- 1536 **Desiderius Erasmus el Rotterdam** — plej grava humanisto
- 1721 **Jean Antoine Watteau** — fama franca pentristo
- 1750 **Johann Sebastian Bach** — plej granda germana komponisto ankaŭ Beethoven
- 1778 **Jean Jaques Rousseau** — franca verkisto
- 1784 **Denis Diderot** — franca enciklopediisto
- 1794 **André Chénier** — franca lirikisto
- 1794 **Maximilien de Robespierre** — franca revoluciulo
- 1841 **Mihail Jurjeviĉ Lermontov** — rusa poeto kaj verkisto
- 1842 **Clemens Brentano** — germana romantika verkisto
- 1856 **Robert Schumann** — germana komponisto
- 1870 **Charles Dickens** — angla verkisto
- 1874 **Fritz Reuter** — (plat) germana humoristo-verkisto
- 1886 **Franz von Liszt** — hungar-germana pianvirtuozo kaj komponisto
- 1888 **Theodor Storm** — germana poeto kaj verkisto
- 1890 **Vincent van Gogh** — nederlanda pentristo kaj litografo
- 1890 **Gottfried Keller** — svisa poeto kaj verkisto
- 1893 **Guy de Maupassant** — franca romanverkisto
- 1896 **Edmont Goncourt** — franca verkisto
- 1903 **James Whistler** — uson-angla pentristo kaj grafikisto
- 1904 **Anton Pavloviĉ Ĉeĥov** — fama rusa verkisto
- 1909 **Detlev von Liliencron** — germana poeto kaj verkisto
- 1920 **Max Klinger** — germana pentristo, skulptisto, gravuristo kaj verkisto
- 1925 **Lovis Corinth** — germana pentristo
- 1929 **Hugo von Hofmannsthal** — aŭstra poeto
- 1934 **Marie Curie** — polfranca kuntelektrovinino de radiumo kaj polonio

El la tirkesto de la redakcio

Da ist allerhand drin an Zeitungen und Zeitschriften, und sicher ist viel Interessantes dabei. Ich hab mich deshalb mal an den Redakteur gewandt und ihn gefragt, ob ich ein bißchen darin herumkranken dürfte. Er hat es mir gern gestattet, allerdings wollte er eine Gegenleistung von mir: ich solle über dies und das ein paar Zeilen schreiben. Nun, wenn's sonst nichts ist, sagte ich, und gab mich dran. Doch bald merkte ich:

Es ist nicht möglich, daß man nun jedes Blättchen, jede einzelne Nummer einer jeden Esperanto-Zeitung und -Zeitschrift eingehend bespreche. Und doch, wie schön und auch wie nötig wäre es. Ich habe nur eine Nummer des (übrigens sehr schön) hektografierten Monats Informilo de „Centra Esperanto-Oficejo“ Torino (Italien) mit dem Titel VERDA STELETO zur Hand genommen und muß Ihnen, liebe Leser, nun davon sprechen. Gleich der einleitende Artikel „For la utopioj“ enthält eine Reihe außerordentlich beherzigenswerter Gedanken. Man mußte ihn ganz veröffentlichen...

Personoj praktikaj, kiuj facile konkludis, ke oni ne povas fratiĝi la mondon per la nura uzado de internacia lingvo, malproksimiĝis de la movado, taksante nin „fanatikuloj“ aŭ „utopiistoj“... Aliaj — ĉe ne alproksimiĝis al ĝi pro tiu antaŭjuĝo... Laŭ la konkludoj de neseriozaj personoj nia afero estas iom surnuba, iom nerealegebla. Ni scias, ke tiuj personoj estas neseriozaj, sed ni ne povas diri tion al ili...

Ni devas esti iom pli praktikaj. Personoj de la ĉiutaga vivo diras: Kristanismo, socialismo, federacismo batalas por atingi iun konkretan, sed ĝis nun ili fuĝetis; ĉu povas „lingvo“ fari miraklojn?

Direktoro de lernejo: Kiel praktika afero. Esperanto povas interesi al ni; kiel ilo, mi volas diri, ilo utila — kaj pri tiu utileco vi devas doni pruvojn! — kiel „kuracilo“ de homaro, ni — kiel „nigra“ de homaro, ni ne povas aprobi ĝin...

Und nun, lieber Leser, bilde Dir Deine eigne Meinung. Es dürfte nicht so einfach sein, wie es scheinen könnte.

Ein aufrüttelndes Schreiben ist auch der „Edifa letero de franca laboristo“. Nur ein paar kurze Sätze daraus: „Justecon ni postulas. Socian justecon per socialisma venko! Cetero estas nur kataplasmo sur kruro el ligno.“ Niemand kann sich der Berechtigung einer solchen Forderung verschließen. Jedoch: die Praxis der sozialen Gerechtigkeit wird leider noch allzu sehr von dem Gestrüpp theoretischer Erörterungen überwuchert. Man denkt an die Pilatus-Frage: Was ist Wahrheit?

Und dann finde ich darin noch einen Artikel, dessen Überschrift ein großes breites NE! ist. Alle Zeitungen müßten ihn veröffentlichen, denn es handelt sich dabei um unser Sein oder Nicht-Sein. Leider muß ich mich mit einigen Auszügen begnügen.

VI, laboristo, antaŭ via maŝino aŭ en laborejo! kiam morgaŭ oni ordonos al vi ne plu fabriki tubojn nek potojn, sed kaskojn el ŝtalo kaj maŝinpartojn, vi respondos: NE!...

VI, sciencisto en via laboratorio! kiam morgaŭ oni ordonos al vi eltrovi novan mortigan armilon kontraŭ la homaro, vi respondos: NE!

VI, normanda patrino VI, ukraina patrino kaj VI, patrino el San-Francisko, el la Hoangho-valo, de la bordoj de l' Misisipo, de Napolo kaj Hamburgo, de Kajro kaj Oslo — patrinoj de la tuta mondo! kiam morgaŭ oni ordonos al vi naski infanojn: flegistinojn por militaj hospitaloj, kaj novajn soldatojn por novaj militoj, patrinoj de la tuta mondo, vi respondos: NE!

Car se vi ne diras „NE!“, se vi ne diras „NE!“, patrinoj... tiam... tiam...

Und zum Schluß fand ich noch etwas, das wohl nicht Sie allein, sondern alle EP-Leser reizen dürfte:

Por fariĝi bonaj esperantistoj — bonaj parolantoj, skribantoj kaj legantoj — vi devas absolute legi multe da verkoj en nia lingvo, interesiĝi pri diversaj temoj, korespondadi, partopreni kunsidojn, kunvenojn naciajn kaj internaciajn, kaj antaŭ ĉio vi devas postuli tion de vi mem; balbutanta

In der nächsten Nummer:

Bravo, Herr Bundespostminister!

Christaller, nia Nestoro

Esperanto im 1. Halbjahr 1950

Zwei Gedichte von Goethe und Möricke

La skribo de la Pask-insulo

Rivalen von ehemals

La grandaj figuroj

Der Büchertisch

samideano estas pruvo pri malfacileco de nia lingvo (por tiuj, kiuj ne konas Esperanton) kaj anstataŭe ni bone scias, ke nia lingvo estas tre facila. Ne postulu tamen, ke gramatikaj reguloj, stilo, vortrezoro mirakle naskiĝu en via cerbo... Nepre studu, se vi deziras ellerni la lingvon kaj fariĝi spertulo!

Aber was brauch ich das Ihnen noch zu sagen! Wir EP-Leser sind nicht nur theoretische, sondern vielmehr praktische Esperantisten. Mm.

Aus Leserbriefen:

O. Z. O... mi ekĝojis pri EP kaj estas tre dankema al vi... Mi volas iomete mallaŭdi vian ĵurnalon. Mi devas konstati ke ĝi estas tro multekosta... Mia edzino abonas la „Kirchenzeitung“, ĝi kostas 0,80 DM po monato kaj aperas semajne kun 10 paĝoj. La flino legas la „Constanze“, kiu kostas 0,60 DM kun 50 paĝoj. Filo aĉetas sportĵurnalon por 20 pfenigoj, sed la patro pagas 0,50 DM por la 8-paĝa „Esperanto-Post“. (Poste nia estimata abonanto faras proponon pri anoncoj, kiun ni pri-traktos alian fojon.)

Malkaŝe ni diras al vi: vi estas tute prava. Kompare al la nomitaj ekzemploj, EP estas terure multekosta. Sed ni devas objektivaj kaj neŭtrale rigardi la aferon. Ĉu vi ne bonvolas komuniki, kiom da abonantoj havas ĉiu el la nomitaj gazetoj aŭ revuoj? Tio estas la centra punkto. Vi certe ankoraŭ bone memoras, ke ni antaŭ nelongaj jaroj vivis per 1000 kalendaroj ĉiutage, sed kiel? Nu, tia estas la situacio de EP: ĝi vivtenas sin per 1000 kalendaroj. Se ĝi havas la duoblan nombron da abonantoj ol nun, ĝi ne nur havas minimume 16-paĝan amplekson, sed ankaŭ la bildmaterialo estus pli riĉa. Se ĝi havas 5000 abonantojn, ĝi havas kolorajn bildojn kaj ankoraŭ pli grandan paĝonombro. Kaj nun demandu ilin, la supre nomitajn pres-kolegojn, ĉu ili havas 5000 abonantojn! Ili mokridos pri vi, ĉar ĉiu el ili havas la multoblon — kaj ili gajnas. La eldonejo de EP neniam gajnas — sed kompreneble ĝi ja ne povas eĉ perdi, ĉar ĝi devas pagi kompostistojn, presistojn, paperon, farbon, administradon... Konklu-do: Ju pli da abonantoj, des pli ampleksa kaj bona EP, des malpli alta ĝia kosto.

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

Gewerkschaft, sindikato
Arbeitgeber, mastro
Mitbestimmungsrecht der Arbeitnehmer, kuncedraĵo de la laboristoj
Wählt CDU, SPD usw., Balotu por CDU, SPD ktp!
Ostvertriebener, elpelito el Orientgermanujo
Flüchtling, fuĝinto
Ostblock, orienta ŝtataro
Drohung der UdSSR, minaco (fare) de la Sovjetunio
Bedrohung der UdSSR, minaco al la Sovjetunio
Friedensbedrohung, minaco al la paco

Kriegsdrohung, minaco per milito
Kriegshetze, agito (incito) al milito
Bakterienkrieg, perbakteria milito
Wasserstoffbombe, hidrogenbombo
Freie Marktwirtschaft, libera ekonomio
Freier Markt, libera merkato
Schwarzmarkt, neligitima, kontraŭleĝa, „nigra“ merkato
Nylon, nilino
Büstenhalter, brustotenilo,
Ultraschall, ultrasono
Bestrahlung, priradiado
Fernsteuerung, teledirektado
Rechenschieber, ŝovkalkulilo
Jazzband, jazbandoj
Hubschrauber, helikoptero

H.W.

ŜERCO — LUDO — BONHUMORO

Scienceca atesto

Al ĉiu sendinto de tri markoj grafologo promesis ekzaktan prijuĝon de lia karaktero.

Iu sendis al li, aldone al la letero, bankbileton de dek markoj, petante, ke la grafologo akceptu la plusan monon kiel ekstran gratifikon.

La sendinto ricevis jenan prijuĝan ateston: „Tre estimata sinjoro! Kun plezuro kaj ŝato mi ricevis vian sendaĵon. Via manskribo karakterizas vin kiel bonan, noblan, grandaniman homon: Vi disponas en alta grado la kvalitojn de altruismo kaj kompatemo. Via sincera, honesta karaktero ĉie gajnas al vi amikecon, estimon kaj honoron. Longa feliĉa kaj prospera vivo estas certa al vi! Kun altestimo (subskribo).“

Jam post du tagoj nova letero de la grafologo alvenis: „Fripona kanajlo! La dekmarkbileto, kiun vi sendis al mi, estas falsa. Mi sciigis vian malnoblan trompmanovron al la kriminalpolico kaj dume esprimas al vi mian profundan malestimon.“
J.S.

La festparolanto

„... kaj se ni pripensas, ke Goethe kreis ĉiujn siajn majstroverkojn per ansera plumo kaj ĉe la lumo de mizera seba kandelo, ni devas ekkrii: Kion tiu homo estus eĉ produktinta, se li estus havinta la potencajn helpilojn el la moderna tekniko: skribmaŝinon kaj elektran lumon!...“

En ekzameno

Profesoro: „Sajnas al mi, ke la demando estas tro malfacila.
Kandidato: „Ne, sinjoro profesoro; ne la demando, sed la respondo.“

La pli granda malbono

Sinjoro (al amiko): „Se via infano vespere tiom krias, via edzino endormigu ĝin per kantado.“
Amiko: „Ni jam provis tion, sed la najbaroj petis nin, ke ni prefere lasu la infanon krii.“

Frei

und unabhängig kommentiert die führende übernationale Zeitschrift Politik, Kultur und Wirtschaft:

Die Welt von Morgen

Reich illustrierte, zweifarbige Monatschrift, 24 Seiten, Vierteljahresbezug DM 0,99. Bestellungen beim zuständige Postamt oder direkt beim Verlag:

Liga-Verlag (22a) Opladen

A 2 11

Silab-enigmo

Formu el la 25 silaboj:

a — ak — be — ĉi — da — de —
den — din — go — i — i — lo —
lo — ma — mis — mo — no —
o — op — re — ta — ti — ti —
to — vi

8 vortojn de jena signifo:

1. kio meritas esti vidata
2. insekto laborema
3. parto de la fervojo
4. alta celo, imagoj
5. malfeliĉa okazo
6. fortega grandegulo
7. spirita vido
8. filozofia sistemo pri la bono

La unuaj kaj triaj literoj de supre al malsupre nomos latinan sentencon. Hans Fricke, Frankfurt a. M.

El Lundo fariĝas Ĉarmo

L	U	N	D	O
Ĉ	A	R	M	O

Sanĝu ĉiam nur unu literon!

Ekvacio = Gleichung

(a — blo) + (b — tario) +
(c — kio) = x
a = teknikaĵo, b = oficisto, c =
urbeĝo en Azio, x = akvo-veturilo.

Guste — Richtig!

Patro (al sia fileto): Vi estas porkido! Ĉu vi scias, kio estas porkido?
Fileto: Jes, patro, mi scias. Ĝi estas infano de porko.

Esperanto in der Tasche

Ein Sprachführer für den Gebrauch unserer Sprache im täglichen Leben

mit einer vollständigen Sprachlehre

Von Wilhelm und Hans Wingen

12×23 cm, 44 Seiten mit zweifarbigem Umschlag, Preis 1,60 DM zuzüglich Porto.

Begegnung / Allgemeine Redewendungen / Erkundigung nach dem Wege / Reise / Hotel / Gaststätte / Aufstehen / Zeit / Familie / Verabredungen / Wetter / Stadtrundgang / Ausflug / Postamt / Bank / Zoll / Arzt / Der menschliche Körper / Friseur / Kaufhaus / Kleidung / Haus / Briefwechsel / Esperanto-Bewegung / Vergnügen / Sport / Spiele / Technik / Maße und Gewichte

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn



La nova medikamento

„Nu, mia kara, elprovinde je ni mem la novan medikamenton „Esperdono“, ni radikale esperdonos al la mondo per Esperanto.“

Solvoj de la enigmoj el n-ro 6

Krucigantaj silaboj

Horizontale: 1. Elektro 2. tro 3. katumo 5. gorilo 7. moro 9. kolo 10. mato 11. oro 12. stano 14. loto 16. Maroko 18. odoro 19. komizo.

Vertikale: 1. Enigmo 2. trogo 3. kalo 4. novelo 6. rito 8. romano 9. korolo 10. mano 12. stacio 13. koro 15. topazo 17. maro 17. koko.

Enigma rondo

1) Leo 2) oceano 3) novembro 4) bromo 5) monoklo 6) lodo 7) dolaro 8) roko 9) kolego 10) gorilo 11) loĝio 12) oleo.

LUMO fariĝos MITO

I. LUMO LIMO LITO MITO

Vizitkart-enigmo: bierfársto

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Hauptstr. 17. Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Viertel: jährlich 1,50 DM zuzüglich —12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Mehr Esperantisten

werben Sie für Esperanto mit unserem Flugblatt

Esperanto auf einem Blatt

27×36 cm groß, zweiseitig bedruckt. Preis je Stück 5 Pf.

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn

Unsere Anzeigenpreise:

Zellenpreis: 0,20 DM

Für Kleinanzeigen Worttarif:

Korrespondenz, Familienanzeigen, and. Privatanzeigen je Wort 0,10 DM
Fettdruck je Wort 0,20 DM
Geschäftliche Kleinanzeigen je Wort 0,20 DM
Fettdruck je Wort 0,30 DM

Dieser niedrige Tarif ermöglicht es jedem, seine Wünsche in Anzeigenform zu veröffentlichen. Sie werden mit dem Erfolg zufrieden sein.